Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda


Majo 1997 | 68-a jaro, n-ro 5 (1103

ISSN 1163.0442 | *Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem* | MENSUEL/MONATA

Kio nova pri nia PIV ?

speciale por Sennaciulo de M. Duc Goninaz, p. 51

p. 51



1-a de majo
Internacia Laborista Tago

EN ĈI NUMERO

- Komuniko de Akademio de Esperanto
- Kiel statas nia PIV
- Feŭda vilaĝo en 1997
- Eŭropa marŝado kontraŭ la senlaboreco
- Sindikatismo en Hungario
- Fronto kontraŭ la "Nacia Fronto" kaj faŝismo en Strasburgo
- Alvoko de la sekretario de Ĝenerala konsilantaro
- La rajto aborti aŭ ne ?
- Raporto de FAU pri la Orienta Eŭropo
- Novaĵoj tra Internet
- Kongreso - provizora programo
- El Esperanto-movado
- SAT-Erinaco

SAT SUR TTT : http://www.worldnet.net/~sat-esp/

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo

Karaj,
al ĉiuj niaj legantoj, kiuj vivas kaj nutras sin kaj sian familion per la ricevita salajro (aŭ labore gajnita pensio), senkonsidere ĉu ili nomas sin laboristoj aŭ ne, mi bondeziras okaze de la Unua de majo - Internacia Laborista tago.
Jen, jam vi legas la majan numeron de Sennaciulo kio montras ke la somero alproksimiĝas kaj kun ĝi nia Kongreso en Aŭgsburgo. Ne atendu la lastan momenton por aliĝi, ĉar ni bezonas vin ĉiujn por pridiskuti pri la estonto de nia asocio. Ni atendas konkretajn proponojn por ke ni povu dum la kongreso alpreni same konkretajn decidojn. En la nuna mondo SAT estas nepre necesa kaj tion montras multaj aktualaj eventoj. Kion fari kaj kiel agi por altiri gejunulojn kaj pliajn membrojn, ĉar nur forta SAT povos esti efika kaj ludi vere utile sian rolon ? Jam nun ni pripensu kaj venu al Aŭgsburgo kun ideoj kiuj povos doni novan rejunigitan aspekton kaj agkapablojn al SAT.

Via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo : 67, avenue Gambetta, F-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, Telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
E-poŝto : sat-esp@worldnet.net.
Oficejo malfermita : lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo : 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto : SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas : Redakta komitato - Y. Peyraut, P. Lévy kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo : SAT, 67, avenue Gambetta, F-75020 Paris, Francio.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, F-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication : Yves PEYRAUT.
Abonnement annuel/jara abono, France : 320 FF.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

AKADEMIO DE ESPERANTO

de 1905 sendependa lingva institucio

GAZETARA KOMUNIKO

La Estraro de Akademio de Esperanto, kunsidante en Bazelo la 24-an de januaro 1997, decidis unuanime :
a) malfermi enketon pri la agoj de kolego Reinhard Haupenthal kontraŭaj al la statuto de AdE;
b) nomumi kolegon Rüdiger Eichholz kiel komisiiton pri la koncerna enketo, kiu finiĝos per raporto al la pleno, konforme al la artikolo 14 de la statuto de AdE;
c) disponigi al kolego Eichholz la koncernajn dokumentojn, kaj inviti lin akiri de kolego Haupenthal la defendajn argumentojn kaj pruvojn;
d) suspendi kolegon Haupenthal el ĉiuj rajtoj kaj devoj de akademiano, tiel longe kiel daŭros la enketo;
e) diskonigi ĉi tiun decidon per gazetara komuniko.

La art. 14 tekstas jene : Pri eventuala eksigo la Akademio decidas, se eble post esploro de la klarigoj de la interesato, per absoluta plimulto de la voĉdonantoj se almenaŭ du trionoj de la membroj voĉdonis, alie per absoluta plimulto de ĉiuj membroj. En okazo de nombroegaleco de la voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon.

OKAZE DE

1-A DE MAJO

INTERNACIA LABORISTA TAGO

LA P.K. DE S.A.T. BONDEZIRAS
AL ĈIUJ GEKAMARADOJ

SOLIDARECO

Nia malnova membro, k-do Marc Delforge el Belgio havis gravan akcidenton kaj havas fendeton en la femurosto. Pro lia aĝo, la flegado estas malfacila. Ĉiuj kiuj deziras povas sendi al li sian simpation kaj moralan subtenon al la adreso :

K-do Marc DELFORGE
"Magnolia"
rue Léopold 314 (ch.805)
BE-1090 Bruxelles
Belgio

KOMUNIKO

K-do Nikola MLADENOV
Ĵk Sveta Troica
blok 145-B, vhod B, et. 5,
ap.110
BG-1309 SOFIA, Bulgario
serĉas tekston, kiun li verkis tuj post la "majaj" eventoj kiuj okazis en Barcelono en 1937. Verŝajne tiu teksto aperis en la "Informa Bulteno de CNT-FAI". Ĉu iu kamarado posedas tiujn dokumentojn kaj povas transdoni la cititan tekston al kamarado Mladenov ?



El la Mondo

ESPERANTIO

Kiel statas nia PIV?

Kiam, en 1990, la Plenum-Komitato de SAT proponis al mi — aŭ en 1991, kiam mi akceptis — prilabori revizion de PIV cele al nova eldono, mi ne imagis la amplekson de la tasko — eble feliĉe, ĉar probable mi ne akceptintus! Ni deziras, diris tiam la P.K. »ordigi la vortaron, enigante la suplementon kaj la ilustraĵojn; enŝovi la novajn vortojn kaj korekti la ekzistantajn erarojn.« Ne tro malfacila laboro, ĉu ne? Tiom pli, ke Waringhien en februaro 91 eldiris sian kontenton pro mia akcepto, donis kelkajn konsilojn kaj promesis revizii la modifojn, kiujn mi enkondukos...



Fotis : H. Masson

K-do Yves Peyraut, prezidanto de la P.K., transdonas ĵus aperintan ekzempleron de PIV kun Suplemento al k-do Waringhien en la jubilea jaro 1987.

Bedaŭrinde, teknika problemo malfruigis la laboron. La skanadon plenumis Claude Roux, sed la korektado de la skanita teksto de nia vortaro daŭris longe, kaj en 1994 Claude Roux kaj mi avertis la partoprenantojn de la SAT-Kongreso en Straĵnico, ke, se ni ne trovos rapide sufiĉe multajn kaj laborkapablajn volontulojn por tiu laboro, ni ne povos garantii la progreson de la revizio. Tiu alarmo efikis tiel, ke du jarojn poste, danke al la dek ses gekamaradoj, kiuj suferigis siajn okulojn super tiu tasko, tiu prepara laboro estis finita kaj ni povis komenci la enkomputiligon de la modifoj.

Intertempe (t.e. jam ekde 1991) estis progresinta la revizia laboro. Unue per utiligo de la notoj, kiujn Waringhien faris sur sia ekzemplero de PIV por estontaj modifoj (tiun ekzempleron mi povis konsulti danke al la kunlaboremo de »La Kvinpetalo« en Bouresse, kiu posedas la bibliotekon de Waringhien) kaj de diversaj rimarkoj, kiuj troviĝis en la arkivo de k-do Levreaud, kunlaborinto de Waringhien por la »Suplemento«. Due, danke al la kontribuoj, kiuj atingis nin iom post iom (kelkaj alvenas ankoraŭ nun), kaj kiujn sendis tre multaj kunlaborantoj el ĉiuj regionoj de Esperantujo.

La unua alvoko, kiun faris jam en 1991 la SAT-Oficejo, ricevis tre limigitan eĥon, kvankam ĝi estis sendita al ĉiuj membroj de la Akademio de Esperanto, al la dekanoj de la Akademio Internacia de Sciencoj (San-Marino) kaj al la gvidantoj de la fakaj asocioj, registritaj en la Jarlibro de UEA. Dua alvoko estis farita kelkajn jarojn poste al kelkaj dekoj da aparte kompetentaj esperantistoj, kiuj ne estis trafitaj de la unua alvoko. Intertempe, per personaj kontaktoj kaj pro la diskonigiteco de la entrepreno (kiu do parolis iam pri »laboro sekreta«?), ni sukcesis arigi teamon el ĉ. sesdek fakuloj (inter kiuj troviĝas dek unu membroj de la Akademio de Esperanto), regule kunlaborantaj kaj zorgantaj pri la diversaj fakaj partoj de nia leksiko. Proksimume sama nombro da homoj sendis al ni diversajn rimarkojn — kelkafoje multnombrajn kaj tre gravajn — pri la ĝisnuna enhavo de la vortaraj artikoloj. Danke al ili la laboro povis progresi, ĉar du rimarkoj pri eraretoj, rimarkitaj de simpla lingvo-uzanto pli valoras, ol dek gazetaj artikoloj pri la dezirindaj profilo kaj strukturo de La Ideala Vortaro.

Al sia laboro teknika por skanado kaj solvado de multaj komputikaj problemoj Claude Roux aldonis la kunordigadon kaj kundiskutadon de la kontribuoj, kiuj koncernas la sciencojn de la vivo kaj de la materio t.e. la plej pezan kaj malfacilan parton de la faka laboro. Danke al la laboro de niaj kunlaborantoj gravaj fakoj, kiel anatomio, beletro, botaniko, ekologio, ekonomiko, geologio, kemio, komputiko, kuirarto, matematiko kaj statistiko, medicino kaj



El la Mondo

PLENA
ILUSTRITA VORTARO
DE
ESPERANTO
KUN
SUPLEMENTO

1887★1987

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

kirurgio, muziko, paleontologio, psikologio kaj psikiatrio, trafiko, zoologio k.a. estas jam pritraktitaj aŭ estos baldaŭ fintraktitaj. La laboro super kelkaj aliaj fakoj (biologio,lingvoscienco, religioj, teknikoj...) ankoraŭ ne estas finita, sed troviĝas sur bona vojo.Por pluraj el tiuj fakoj necesis plena reorganizo. La terminoj koncernantaj ekologion kaj komputikon evidente plimultiĝis. La vortoj, inkluzive de la propraj, rilatantaj al la politika situacio de la mondo, ricevos kompreneble ĝisdatajn difinojn kaj informojn.

Ni ankoraŭ ne povas difini precizan daton por la livero de la »manuskripto«, sed ni jam ekvidas la finon de nia laborado. Ni povas esperi, ke post ne tro longa tempo SAT povos disponigi al la esperantistaro plibonigitan eldonon de vortaro, kiun iniciatis Lanti kaj realigis Grosjean-Maupin kaj Waringhien.

Michel DUC GONINAZ

BRITIO

FEŬDA VILAĜO - EN 1997

Kelkajn kilometrojn for de mia hejmo, apud la limo inter du graflandoj en la angla mezlando, troviĝas malgranda vilaĝo kiu nomiĝas Tissington. Ĝi estas fama pro la antikva kutimo, ankoraŭ konservita, de garnaĵo de putoj.

Sed vere, la vilaĝo devus esti fifama pro sia mezepoka karaktero. Kavaliro Richard FitzHerbert, baroneto, posedas la tuton. Li loĝas en grandioza domego kiu superregas la vilaĝon. Tissington Halo estis konstruita de praulo de Kavaliro Richard, en 1609. Sed tiun Halon anstataŭis biendomo kun ĉirkaŭfosaĵo. Vilhelmo la Venkinto donis ĝin al la prauloj, kiam ili akompanis la Normandojn al Anglio.

Reĝo Georgo III - la frenezulo - investis baronecon sur la prapatro de Kavaliro Richard en 1784.

La Tissington bieno konsistas el proksimume 1000 hektaroj kaj Kavaliro Richard riĉiĝas per la terlupagoj kiujn pagas la okupantoj de la diversaj farmoj, dometoj de la vilaĝo - efektive 13 farmoj, 40 dometoj, 3 butikoj kaj kafejo. FitzHerbert ankaŭ posedas fiŝkaptrajtojn de du riveroj, kaj eĉ vilaĝ-lernejon kaj vilaĝ-halon.

Sed kompreneble, terposedanto FitzHerbert estas eta afero kompare kun la grandaj terposedantoj de heredaj nobeloj, kiuj ja posedas grandegajn bienojn kaj multe da tero - ekstreme valora - en la urbegoj de Britio.

Aserti la rajton de terposedo estas aserti postulon kiu havas nenian mandaton en la naturo. La egala rajto de ĉiuj homoj al la tero estas tiel klara kiel la rajto spiri la aeron.

Ekzistas nenia potenco kiu rajtus doni al iu ajn ekskluzivan posedaĵon de la tero. Kaj ni ne povas fordoni la rajtojn de niaj posteuloj. Ni ja estas nur provizoraj okupantoj de la tero.

Ni konsentis, generacio post generacio, al la »rajtoj« de FitzHerbert, baroneto (la malplej alta hereda titolo), ĝis tiuj de la centoj da dukoj (la plej alta). Sed la posedeco de tero estas la bazo de aristokratio kaj la terposedanto havas ĉiujn povojn kiujn havis lia antaŭulo, la feŭda barono.

La esenca politika trajto de feŭdismo estis la malcentralizo de potenco, kaj ĉia potenco estis bazita sur la posedeco de la tero. La Reĝo Vilhelmo donis ĝin al siaj sekvantoj pro militaj kaj aliaj servoj. Kune kun la posedo de la tero estis la politika rajto regi la homojn kiuj kultivis ĝin, gvidi kortumojn kaj kolekti impostojn.

Tio estas la origino de la posedeco de Tissington.

Kiel skribis Mark Twain :

»Ĉiu pligrandigo de la loĝantaro, ĉiu ekspansio de komerco, ĉiu progreso de artoj kaj sciencoj, kiel ni ĉiuj scias, pligrandigas la tervaloron kaj luprezojn.«

Kiel diris la terposedanto : »kian gloran tempon mi pasigas ! Luprezo kaj profito, profito kaj luprezo, kaj nenia limo al unu aŭ la alia, esceptinte la kapablon de la laboristoj pagi.«

Vilĉjo Simcock

HELPO AL LA ASOCIO

En Francio (FRF) Lebec 50,00; MKE 500,00; N. Dejean 10,00; P. Quillaud 10,00; F. Piedrafita 220,00; P. Dehan 240,00; G. Lascours 10,00;

En Pollando (PLZ) I. Solecka 10,00

En Nederlando (NLG) Kerwezee 1,00; B. Weber 9,00; C. Landwehr 4,00; J. Ponger 5,00; H. Nijboer 16,00; F. Klaver 14,00;

En Japanio (JPY) H. Nakamura 400,00; K. Oosaki 6000,00; K. Abe 5000,00; T. Oohara 225,00; T. Hirayama 1000,00;

SOLIDARSERVO

En Japanio (JPY) A. Morita 9800,00;




El la Mondo

EŬROPO

LA EŬROPA MARŜADO KONTRAŬ LA SENLABORECO

»La Eŭropa marŝado kontraŭ la senlaboreco« foriros de pluraj landoj meze de aprilo 1997 por konverĝi meze de junio ĉe Amsterdamo (Nederlando), kie finiĝos la interregistara konferenco (C.I.G.) La marŝantoj foriros la 14-an de aprilo de »simbolaj lokoj« kiel Maroko, Bosnio aŭ Pollando por retroviĝi la 14-an de junio ĉe Amsterdamo. La marŝadon iniciatis franca asocio »Agir contre le chômage AC !« (Agi kontraŭ la senlaboreco). Partoprenos sindikatoj kaj asocioj de senlaboruloj el Eŭropo.
Partoprenu, subtenu kaj helpu la partoprenantojn de tiu internacia ago. Kontaktu sindikatojn kaj asociojn de senlaboruloj en via lando.
Kontakto en Francio :
AC ! »Agir contre le chomage«, 42 rue d'Avron, FR-75020 Paris, Francio. Tel: 01.40.09.27.49 enlande kaj +33.1.40.09.27.49.
Vidu la mapon dekstre.



Plenaj linioj montras la marŝvojojn antaŭviditajn per organizaj organismoj en diversaj landoj. Interrompitaj linioj ne estas certaj.

Bruno Henry

HUNGARIO

SINDIKATISMO EN HUNGARIO

Antaŭ 1989 ĉiu hungara laboristo estis devigata aliĝi al la laboreja sindikato. Plej ofte la laboristo mem eĉ ne estis demandita pri la aliĝointenco. La laborafera oficisto aŭtomate membrigis la dungaton kaj en la estonto oni subtrahis la membrokotizon el la salajro, ĉiumonate. Fojfoje la laboreja sindikato kunvokis la membraron kaj la sekretario legis la antaŭpreparitan tekston pri bagatelaj aferoj. Nur kelkfoj okazis diskuto post prelego ĉar ĉiujn tedis la tuta sindikata movado, kiu ne servis laboristajn interesojn. Ĝi neniam povis helpi al la laboristoj. Ja, la gvidantaro de fabrikoj kaj entreprenoj estis ankaŭ la kapo de la sindikato. La laboristoj devis elekti ilin unuvoĉe, sen kontraŭdiro.

Dum pli ol kvardek jaroj ili sukcesis planti semon de indiferenteco. Sindikato estis deviga organo kiun ĉiu laboristo devis apogi por ke la Okcidento vidu kiel progresas la demokratio en socialistaj landoj.

Simila estis la sindikata movado ankaŭ en aliaj socialistaj landoj en Eŭropo. En 1980 okazis provo en Pollando por veki tieajn laboristojn el plurjardeka dormo, sed la tiamaj polaj gvidantoj perforte subpremis ĝin kun la helpo de la tiama Sovetio.

Devis pasi pli ol 15 jaroj ĝis en tiu tereno de nia kontinento okazu politika kaj ekonomia ŝanĝiĝoj kaj malfermiĝo de la vojo al la direkto de demokratia sindikatismo. Sed intertempe plenaĝiĝis generacioj, kiuj scias preskaŭ nenion pri la vera laborista movado, ĉar dum jardekoj ili estis misinformataj. La junularo ne povis ekkoni ĝin kaj ankaŭ ilin infektis la indiferenteco.

Nun, tion ĉi eluzas la hungaraj novkapitalistoj. Pro tio venas volonte la eksterlanda kapitalo al Hungario, ĉar ĉi tie ne ekzistas fortaj, batalemaj sindikatoj, kiuj kontraŭstarus la ekspluatadon

fino paĝo 55



El la Mondo

FRANCIO

FRONTO KONTRAŬ LA »NACIA FRONTO« KAJ FAŜISMO EN STRASBURGO

Sescent mil homoj manifestaciis la 29-an de marto 1997 kontraŭ la rasista kaj faŝista »partio«, Nacia Fronto (F.N.) dum la nacia kongreso kiun ĝi okazigis dum tri tagoj en Strasburgo, sidejo de la Eŭropa komunumo.

La 2200 delegitoj de la Nacia Fronto ne montris sin en la urbo kaj restadis enfermitaj en la kongresejo pro manifestacio. Ene, oni malmulte parolis pri la ekonomia kaj socia programo de F.N. , sed pri »la nacia prefero«, kio estas eksigo de la enmigrantoj el la socio. Multaj asocioj, partioj, sindikatoj kaj multe da civitanoj el diversaj regionoj de Francio kaj eĉ el Belgio, Germanio, Anglio partoprenis la manifestacion. Mi vidis ankaŭ sindikatistojn de la fervojo kaj ferindustrio el mia loĝregiono - Loreno. Hazarde kaj plezure mi renkontis amikon kiu estas gastiganto de l'Amikeca Reto. Mia edzino kaj mi estis meze de multaj gejunuloj kiuj varmigis la etoson. Ni kriis : » Unua generacio, dua generacio, ni estas ĉiuj enmigrintoj!« » **F** kiel faŝisma, **N** kiel naziisma«. La manifestantoj estis bonhumoraj kaj skandis multe da sloganoj. Multaj portis interesajn afiŝtabulojn. Amuzis min vidi la prezidanton de la Nacia Fronto, LE PEN, desegnita kiel makako sur afiŝtabulo kie estis skribita : »La sola malsupra raso estas la faŝismo«. Tiu civitana releviĝo kontraŭ tiu faŝisma kancero, kiu progresas en Eŭropo kaj regresigas la socion kaj la rajtojn de civitanoj, donis al multaj pli da espero kaj memfido. La sukceso de la manifestacio alvokas nin al pli da socialaj bataloj por trovi daŭrajn rimedojn kontraŭ ĉiuj malbonoj kiel senlaboreco, mizero... sur kiuj fermentas la rasisma demagogio kaj la ultra liberalismo de la Nacia Fronto. Ankaŭ ni deva lukti skontraŭ F.N. per ideoj. Revene al nia hejmo ni diskutis en la trajno kun enmigrintoj, francaj geedzoj en Luksemburgio, kiuj diris : »hodiaŭ ni donis baton al Le Pen«. Vespere la televida ĵurnalo multe parolis pri la »sukcesa manifestacio« kontraŭ la Nacia Fronto, kio nervozigis Le Pen.

Bruno Henry

RECENZO - T. Pinet

Roland LEVREAUD »Ne nur vortoj, sed agoj«, SAT-Broŝurservo, 1997, 112 p.

Omaĝe al Roland Levreaud, la eldonejo de »Laŭte« aperigis samtempe du broŝurojn : »Prelegoj kaj aliaj artikoloj« (eltiritaj el »Sennacieca Revuo«, - vidu recenzon: Sennaciulo, februaro 1997, p. 20) kaj »Ne nur vortoj sed agoj«, kolekto de 26 artikoloj aperintaj inter 1950 kaj 1989 en diversaj gazetoj.

Relegante ĉi tiujn mallongajn komentojn pri eventoj, kiuj foje trafis nin antaŭ kvardek jaroj, ni miras pro la klarvideco de ROL. Ekzemple, en 1956, ses jarojn antaŭ la fino de la alĝeria milito, li ĝuste antaŭvidas ne nur la finon de la konflikto sed ĝian sekvon : »...la liberigita popolo konatiĝos kun novaj mastroj : malprogresema pastraro, subaĉeteblaj kaidoj, nekapabla sintrudema burokrataro...« (p.21).

La titolo, »Ne nur vortoj sed agoj«, bone spegulas la spiriton de la artikoloj. La informoj, la pripensoj estas nutritaj de persona agado, celas rektan aplikon, praktikan faron.

Ses kontribuoj temas pri lia, nia, esperantista agado (ekz: SAT-ano?...Kial?..., p.12), aliaj memorigas al ni la multfacetan aktivadon (»Saĝa modero en aktivado neniam estis atuto mia«, el letero, 1991) de nia kamarado : lukto por la paco, kontraŭ rasismo aŭ poluado, sed ankaŭ biciklado aŭ kinarto.

Aparte elstaras la »raportoj«, pri militrifuzantoj, Leningrado, kaj ĉefe pri lia laboro en Internacia Urĝa Agado. Mia San-Dominga vilaĝo post la ciklono (p. 78) estas miregiga. Nenie troviĝas pli perfekta konkretiĝo de la »interna ideo«, de la »homaranismo«, de la »eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo«. Tiujn ĉi dekdu paĝojn, indajn je niaj plej bonaj verkistoj, ni pli larĝe disvastigu; en ili kuniĝas beletraj, emociplenaj tamen precizaj priskriboj, kaj klara analizo de ekonomiaj aŭ politikaj faktoj.

Multaj el ni ja atestas lian neforgeseblan influon sur sia tuta vivo, kvankam Rolando mem malŝatis pezi sur la aliajn. Jen persona ekzemplo. Kiam printempe de 1992 mi aludis, ke pro li mi neniam kabeos, li malgraŭ *»centra nigra truo en la vidkampo«* longe respondis :

»...Mi preskaŭ neniam parolis pri tio (kabeado de K. Bein). *Sed apenaŭ flavbekulo, fascinis min tiu meteoro : persono, verko, itinero, ĉio naskis en mi admiron kaj respekton - inkluzive de lia retiriĝo. Certe mi dezirus funde studi lin : tio restos en la riĉa meblita tombejo de miaj projektoj' «*

Esperanto ne estas ordeno kun eterna voto. Kial oni ne restus libera transiri al alia aktivaĵo ? Sed ĉio dependas de la maniero : alportinte tiajn trezorojn al la literaturo, subite silenti kaj teni dum jardekoj tiel dignan sintenon, neniam nocante la movadon; saluton !...«.

Turmenta bedaŭro trafas min : nian tro modestan amikon, ĉiam helpeman, ni ĉiuj uzis, trouzis, ne lasante al li sufiĉe da tempo por persone verki...

ALVOKO DE LA SEKRETARIO DE ĜENERALA KONSILANTARO

Mi uzos Sennaciulon kiam mi volas atingi la Ĝeneralan Konsilantaron (Ĝ.K.) kaj la SAT-Aktivulojn en la mondo, ĉar la sveda poŝto ĉiam altigas la poŝttarifojn kaj pro tio la korespondado ekstersvedia iĝis tre multekosta afero.

Estas bone ke la informilo »LEA-Ligilo« estas kreita en kiu la diversaj LEA-oj povas informi pri siaj aktivadoj favore al la Laborista E-movado, sed mi opinias ke ankaŭ Sennaciulo devas fari la samon por ke la tuta SAT-anaro povu ĉerpi varbideojn el tiaj informoj.

Ĉitage estas nur la LEA-organizaĵo SAT-Amikaro kiu bone prosperas. Multaj aktivaj SAT-amikaranoj ja havas spertojn pri tio, kiel ili solvis la varbadon al sia organizaĵo kaj al SAT. Iliaj spertoj devus esti al dispono de la tuta SAT-anaro, por ke oni el ili ĉerpu ideojn kiel garantii prosperan estontecon al SAT.

En la periodaĵo »Laŭte !«, n° 127, k-do Rajmondo Raurich (R.R.) verkis artikoleton kun la titolo :
»La laborista E-movado kien ? Kiel ? »
Tiu kontribuaĵo estas admono al diskutado pri kiel plivigligi la laboristan esperantismon en la mondo, inkluzive SAT. K-do R.R. demandas : »Kiam oni deziras varbi en laboristaj medioj, kiujn kontakti ? Kiuj klasaj argumentoj taŭgas en laboristaj medioj ?
a) lingvaj : racieco, ktp...
b) ideologiaj : Esperanto kiel ilo en la manoj de la laboristaro, nun kiam estas evidenta la tutmondiĝo de ekonomio ?
c) historiaj : kiuj bremsis la disvolvadon de Esperanto (la kapitalismo, la burokratismo - partia kaj sindikata), tiuj montras la danĝeron, kiun povas prezenti Esperanto laŭ ilia vidpunkto.
d) La esperantistaj laboristoj estas simplaj laboristoj, ne geniuloj.

Kiel kunordigi la strebadojn ? Endus :
- listigi la E-laboristojn laborantaj en la grandaj firmaoj, privataj kaj publikaj, en Francio, en Eŭropo, ktp. Kiel interrilatigi ilin ? Kion proponi al ili ?
- grupigi tiujn, kiuj deziras agi ĉe la aktivaj laboristoj, la emeritoj, la senlaboruloj, komencante ekzemple en Francio.
- tuj anonci en nia E-gazetaro la starigon de kunordiga grupo kaj ties celaron.
- serĉi inter la laboristoj de la grandaj firmaoj la kamaradojn, kiuj deziras varbi en siaj entreprenoj. Peti iliajn planojn, iliajn bezonojn.
- esplori kiel helpi ilin per materialo, per diskutoj kun eksterlandaj kamaradoj, ktp...

***

Jen la ideoj de k-do R.R. Mi transdonas al la Sennaciulo-legantaro liajn proponojn kaj esperas ke troviĝas adeptoj kiuj pretas realigi ilin. Bonvolu provizi la redaktoron de Sennaciulo per materialo kiel prosperigi la SAT-organizon.

Sennaciece salutas -
P. Persson
K.K.-sekretario

NEKROLOGO

Ni ĵus eksciis ke en Vilnius (LT) mortis 81-jara, tre konata litova esperantisto, nia kamarado

Adomas VAITILAVIĈIUS
(matr. 33.725).

Ni kondolencas al la familianoj kaj geamikoj.

***

En Monfalcone (IT) mortis la 8-an de julio 1996 nia kamaradino

Nidia MALARODA
(matr. 32.299)

Ni kondolencas al nia kamarado Vittorio kaj lia filino Manuela.

***

En Düsseldorf (DE) mortis 90-jara, nia malnova kaj fidela membro, kamarado

Friedrich HERBST
(matr. 26.852)

Ni kondolencas al familianoj kaj germanaj SAT-anoj.

KOREKTO

En la Kongresraporto (N°de oktobro) ni erare indikis ke nome de japanaj SAT-anoj salutis k-do Oohara. Fakte la salutanto estis k-do **AOSIMA Sigeru.**

Ni petas pardonon al k-do Aosima kaj al niaj legantoj pro tiu eraro.

SINDIKATISMO EN HUNGARIO - fino

de la laboristoj fare de la novaj koloniistoj. Por ili Hungario estas bonega tereno por profiti el la ŝvitgutoj de la homoj, kiuj laboras kiel sklavoj kaj ricevas malaltan salajron.

Se baldaŭ la hungara laboristaro ne rekonsciiĝos kaj protestos kontraŭ la brutala ekspluatado, tiam la tuta lando estos forvendita kaj ĉarlatanoj, novkoloniistoj, kaptos la potencon kaj ekregos. Ili subpremos ĉiun, kiu kuraĝos malfermi la buŝon por protesti pro la malbonaj vivkondiĉoj. Tiu ĉi vojo kondukos al plena renverso kaj falo en la abismon pro la kripligo de la homa animo.

Eble la bildon pri nia estonto mi skizas tro nigre, sed ni devas vidi nian situacion per reala okulvitro, ne lasante nin misgvidi per rozkoloraj promesoj kaj allogoj de la rapidega riĉiĝo. La kapitalismo ĉiam trovas manieron bremsi la plenan socialan egalecon inter la homoj kaj fari malamikecon por ke la diversaj popoltavoloj disiĝu unu de la alia.

Ŝajne tio ĉi sukcesas en Hungario kaj la laboristaro ne havas rajton por trovi hejmon en ĉi lando. Ĉu tio ĉi estas la okcidenttipa demokratio ?

Adalberto

LEA-OJ
UZU VIAN
SPACON
EN SENNACIULO

LIBERECANA FRAKCIO DE S.A.T.



LA RAJTO ABORTI AŬ NE ?

En multaj landoj - precipe tiuj, kiuj estas sub la katolika influo, daŭras severaj bataloj pri la rajto mem decidi pri aborto. En Usono ekzemple, la aktivuloj de la movadoj PRO-LIFE (Pro-vivo) ne hezitas detrui klinikojn, murdi kuracistojn. Kontraŭ tiuj mezepokaj moroj la aktivuloj de la movadoj PRO-CHOICE (Pro-elekto) devas konstante sin gardi.
En Francio, dum jardekoj, (post iu leĝo voĉdonita en 1920) la memvola aborto estis malpermesita - kaj sub la influo de pluraj protestmovadoj, finfine kvar leĝoj de 1972 oficiale mastrumas tiun procedon. Inter tiuj organizoj, kiuj batalis, elstaris la Liberecana movado, kies pluraj aktivuloj estis persekutitaj de la tribunaloj.
Malgraŭ la fakto ke estas leĝe permesite aborti laŭ precizaj kriterioj, parto de la franca opiniaro ne akceptas tiun situacion kaj organizas regule kvazaŭ-militistajn atakojn de klinikoj kie estas eble aborti sub kuracista kontrolo. De tempo al tempo la atakoj de tiuj »sturmotaĉmentoj«, kiuj konsistas el integristaj katolikoj, estas malebligataj de grupoj de kontraŭmanifestaciantoj.
Tiel okazis inter alie en 1996 kun la partoprenoj de multaj membroj de la C.N.T. (franca anarko-sindikatista konfederacio). Pro tio aperas regule en la gazeto »Le Combat Syndicaliste« (La sindikatista batalo - monata organo de C.N.T.), artikoloj kiuj komentas tiujn eventojn. Unu el ili (N° de aprilo 1996) precize reliefigis la rolon de iu franca deputitino, s-ino **Christine Boutin**, kiu grandparte gvidas la politikon de tiuj fanatikaj grupoj. S-ino Boutin, post legado de tiu artikolo, sentis sin ofendita kaj procesis kontraŭ tiu gazeto sub la preteksto de misfamigo.
La proceso okazis en la Justicpalaco de Parizo, la 17-an de januaro 1997, kaj la tribunalo decidis ke la leĝa respondeculo de tiu gazeto, nia kamarado **Ivo Peyraut** (prezidanto de la P.K. de SAT) tute ne kulpis pri misfamigo. Inverse la deputitino estis kondamnita pagi... la proces-elspezojn !
Ekster la anekdota aspekto de tiuj eventoj, la batalo daŭras !

Liberecana Frakcio de SAT

Iu legis por vi..

RAPORTO DE LA FAKGRUPO PRI ORIENTA EŬROPO DE FAU
(Libera Laborista Unuiĝo)

Tiun ĉi dosieron ricevis la partoprenintoj de la XX-a kongreso de ILA, pasintan decembron en Madrido. Pro duobla kaj bonvena motivo mi ĝin recenzas, ĉar ĝi estas verkita en Esperanto, do montras al la ILA-membraro la utilecon de sennacieca lingvo kaj ĉar temas pri liberecanaj kaj anarkosindikatismaj grupoj kiuj aperis post la disfalo de la muro en Orienta Eŭropo, ĝi montras al ni bonegan manieron por utiligi la lingvon en la kampo de la sociaj luktoj. Ĝi nun ebligas al ni bonegan propagandadon por E-o en niaj sindikatoj, grupoj, ktp. ..





Se iu interesiĝas pri la temo, bonvolu peti ekzempleron, aldonante almenaŭ unu respondkuponon kaj danku al FAU pri ties trafa iniciato. Sur la lasta paĝo aperas la listo de SAT-perantoj.
Dekkvin paĝoj, kun fotoj kaj kontaktadresoj, tra kiuj oni informas pri diversaj grupoj de orienta Eŭropo kaj la diversaj laboroj kaj agadoj kiujn FAU faris kun aŭ por ili.

Kontaktadreso :
c/o Freie Kultur Aktion e.V., im A-Landen,
Rathenower Str. 22
DE-10559 BERLIN
Tel. /Telekopiilo: 030-3946167.
Retpoŝto:
faubl@anarch.free.de



VIAJ OPINIOJ

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj mem !

ĈU KOMUNA AL ĈIUJ ?

Tute ne amuzis min la aserto de Petro Levi, laŭ kiu la komunisma idealo estas supozinde komuna al preskaŭ ĉiuj SAT-anoj. Knedas min la diablo se mi troviĝas inter tiuj »preskaŭ ĉiuj« (supozeble mi ne estas la sola, kiu rifuzas la aneksadon). Kial ne tutsimple aserti, ke ni estas preskaŭ ĉiuj komunistoj ? ! Sed mi memoras, ke en unu el la laborkunsidoj de la S. Peterburga kongreso, Petro diris, ke li ne vidas diferencon inter liberecanoj kaj komunistoj. Ĉu vi deziras ekskluzivan informon? Dum la venonta kongreso, li aliĝos al la anarkiista frakcio ! Ne, mi ne estas (kia ajn estas la senco, etimologia aŭ ne) komunisto, kaj mi estas eĉ anti, kontraŭ komunisma. Estas la ideoj kaj estas la faktoj. »La faktoj estas obstinaj« diris fama komunisto. Ili montris kaj montras, ke komunismo ne povis, ne povas ekzisti sen apogiĝi sur mallibereco kaj mallibero, sur perforto, malrespekto de la homaj rajtoj, mallibera esprimado, sur mensogo. Tiu etoso okazis aŭ okazas en Sovetunio, en Ĉinio (kvankam famkonata esperantista ĉina revuo mensoge laŭdas la tiean reĝimon), en Serbio, en Kubo, en iuj Afrikaj landoj. Ĉiuj komunistoj, kiuj trafis la potencon (kaj nun arkivoj permesas malkovri la veron longtempe neitan de komunistaj partioj) iĝis inter la plej grandaj krimuloj por gardi la postenon kaj sukcesigi sian idealismon. Ili mensogis-as (ĉiu scias, ke la esprimoj »paroli lingvon el ligno«, »glutigi kolubrojn«, »glate glatigi ofendojn« fontas en la komunismaj kutimoj), perfidis, murdis, detruis korpojn kaj mensojn, malfeliĉigis tutajn popolojn. Estis kaj estas. Multaj el ili naskigis, naskigas faŝismajn, dekstre-ekstremajn grupojn aŭ partiojn, kaj mafion. Kiam ilia rego falas, ne estas eksterordinare vidi, unu apud la aliaj, komunistoj, dekstraj ekstremistoj, mafiuloj, preskaŭ brako en brako manifestacii sur la stratoj por kontraŭi la mizeron, kiun ili naskis. Ili povas ŝanĝi la nomon de siaj partioj au de siaj gazetoj, ne plu nomiĝi komunista partio, aŭ aldoni I, aŭ E al la siglo, la ideologio restas la sama kaj nepre entenas tiujn virtualajn malvirtojn. Mi opinias, ke trikapa hidro minacas la homaron : komunista, faŝista, kapitalista hidroj.

Ferdi VINCE

NEATENDITA RENKONTO

Post duhora vojaĝo aŭte, trajne, buse, por atingi "l'Alliance Française" (Instituto por la instruado de la franca lingvo en eksterlando), kiu situas je la alia flanko de Melburno, 40 km for de mia hejmo, mi nur havis la deziron momente eskapi la 40°C temperaturon de tiu februara mateno kaj retrovi sufiĉe da forto cele al revena vojaĝo. Mi decidis rigardi ĉu estas unu el tiuj mallongdaŭraj ekspozicioj. Enirante la ĉambron mi ekvidis, meze de ĝi, grandajn tabulojn kun fotoj kaj klarigantaj tekstoj sub la titolo "Centre Culturel Jean-Marie Tjibaou" (Kultura centro Jean-Marie Tjibaou). Tjibaou ! Nomo aŭdita en radio kaj vidita sur la unua paĝo de ĵurnalo ĉiutage, komence de okdekaj jaroj kaj por mi ligita al vortoj kiel tumulto, ribelego, perforto... Dum mi staris mense konfuzita pro invado de nenetaj memoraĵoj, iu virino trankvile sidis en angulo. Ŝia aspekto sendube revelis ŝian Kanakan devenon. Marie-Claire Tjibaou, la edzino de Jean-Marie. Per fiera, memfida kaj samtempe serena voĉo, ŝi klarigis ke honore al la ideoj de Jean-Marie Tjibaou malfermiĝos kulturcentro en 1998 sur okhektara tereno de la Tina duoninsulo, donita al tiu projekto de la Komunuma konsilantaro de Noumea en 1991. Tiu centro, kies arkitekturo emfazas la rilatojn inter la Kanakoj kaj la tero, celas disvastigi la nunan Kanakan kulturon kaj proponi renkontiĝlokon al ĉiu kulturoj kaj aparte al la Pacifika regiono.
Estos bela sukceso, kiam neniu plu dubos, ke eĉ nun eblas vivi Kanake, ke malgraŭ la provoj detrui ilin - en 1909, Alberti skribis ke la nombro de Kanakoj estas malkreskanta kaj ke ili verŝajne estos tute malaperintaj post tridek jaroj - la popolo kaj ties kulturo bone fartas (muziko, teatro, pentrado, skulptado, ktp). La interesoj de la diversetnaj grupoj tiel malsamas ke ĝis nun neniu aŭdacis starigi la atenditan referendumon pri la politika estonteco de la insuloj. Ni esperu ke danke al tiu centro ne nur la diverskulturaj aroj de Novkaledonio finfine interkonatiĝos kaj ne plu vivos flank-al-flanke, sed kune, kaj ke ankaŭ la cetero de la mondo malkovros ĝis nun kaŝitan parton de sia heredaĵo.
Al mia demando, Marie-Claire Tjibaou respondis ke Esperanto ne estas unu el la trideko da lingvoj uzataj sur la insuloj, ke ŝi eĉ neniam aŭdis pri esperantistoj. Poste mi trafoliumis plurajn dokumentojn (SAT-Adresaro, Pasporta Servo, Amikeca Reto) por trovi spurojn de esperantistoj tie. Sensukcese. Nur la kongreslibro de la Universala Kongreso de Seulo menciis du esperantistojn el Novkaledonio, enkalkulitaj kun la francoj. Sed, ĉiuj havas adreson en Francio. Ĉu estas aŭ ne estas esperantistoj en tiu parto de la mondo ?

Franciska TOUBALE

HELPU LA ASOCION ! KUNLABORU !

Novaĵoj tra INTERNET

ZEO-LIBRO APERIS

UEA ĵus eldonis la libron "Monumente pri Esperanto". Ĝi rezultas el 30-jara laborado de Hugo Röllinger, kiu kiel komisiito de UEA kolektis informojn pri ĉiaspecaj ZEO-j, t.e. Zamenhof/Esperanto-objektoj : stratoj, placoj, parkoj, pontoj, konstruaĵoj, skulptaĵoj, ŝipoj, eĉ asteroidoj. Röllinger registris entute 1044 ZEO-jn en 54 landoj de 5 kontinentoj. Tiu tasko postulis de li ne nur zorgeman administradon sed ankaŭ multe da persistemo, inventemo kaj detektiva kapablo. Ankaŭ lia libro enhavas ne nur laŭlandan liston de ZEO-j kun indiko pri la loko kaj la jaro de la ekesto, sed ankaŭ artikolojn, kiuj atentokapte rakontas kolorplenajn historiojn de multaj el ili. La 111-paĝa abunde ilustrita libro estas redaktita de Thomas Bormann. "Monumente pri Esperanto" kostas 18 NLG kaj aĉeteblas ĉe UEA kaj aliaj libroservoj. *Inf.: uea@inter.nl.net*

2-A SIMPOZIO PRI RILATHISTORIO INTER JAPANIO KAJ KOREIO

Tiu ĉi dua simpozio sekvas la unuan kiu okazis lastjare en Seulo. La simpozio celas kunkonstrui komunan komprenon pri la rilathistorio per diskutado en Esperanto. Ĉi-foje ĝi okazos en Kobe, Japanio kaj ni kunlaboros loĝante kune kaj tiel espereble, ne nur seriozaj diskutadoj sed ankaŭ senĝenaj kunamuziĝoj, kuntrinkadoj kaj babiladoj pli kontentigos la partoprenantojn. Plie ni havos malfermitan parton por la ĝenerala publiko, kie la koreaj kaj japanaj fakuloj prelegos kun traduko. Kvankam laŭ la titolo temas pri Japanio kaj Koreio, ni volonte bonvenigas ankaŭ nekoreanojn kaj nejapanojn, ekzemple ĉinojn kaj tajvananojn kiuj havas intereson.

Dato : '97.8.29.ven; 18:00--8.31.dim. 15:00 : 2 noktojn kaj 3 tagojn. Loko : Studenta Junulara Centro en Koobe (Koobe Gakusei Seinen Senter), urbo Koobe, gubernio Hyoogo; Yamada-tyo 3-1-1, Nada-ku, Koobe-si, 657 japanio. Tel. 078-851-2760, fakso: 078.821.5878. Tri minutojn norden piede de stacio Rokkoo de linio Koobe de Fervojo Hankyu.

Kotizo:20,000 enoj por japanoj kaj 9,000 enoj por neloĝantoj en Japanio. La kotizo inkluzivas manĝojn, gastadon, bankedon, dokumentojn por la simpozio. Cetere atendataj estas viaj monhelpoj por partoprenontoj nejapanaj.

Organizas: Esperanto-grupo por komuna lernolibro pri historio. Aŭspicias Studenta Junulara Centro en Koobe, Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj.

Temo : "Azia Pacifika Milito kaj memoro pri ĝi"

Pri tiu temo, unuaj raportantoj povas prepari sian raportaĵon, prefere utiligante partojn en la libro "Historio de Japanio kaj Koreio": Enkonduko. Ni atendas 5 aŭ 6 raportantojn, t.e. 5 aŭ 6 subtemojn same kiel en la lasta simpozio. Kiel subtemoj estas jenaj proponoj: 1) Kiel ŝajnis tenoo en sia tempo en invaditaj aziaj landoj ? 2) Armea konsolvirino kaj perforta trenado. 3) Politiko de tenoo-anigo. Bonvolu sin anonci. Krome estas propono diskuti pri tiu aktiva agado de la liberalisma histori-vida grupo.

Sabate (97.08.30) 13:30-16:30 en la sama loko :

El Koreio, profesoro So Gilsu de Universitato Sokyong, direktoro de Kogu-ryo-Instituto prelegos pri "Kian efikon ankoraŭ postlasas la japania kolonia regpolitiko en la korea popolo kaj kiel klopodas koreoj mem por kuraci sin de tiu efiko?"

El Japanio, profesoro Mizuno Naoki el Instituto pri Prihoma Scienco en Universitato Kyoto prelegos pri : Japania kolonia regado kaj Azia Pacifika Milito", kie li analizos kian aspekton havis Japania kolonia regado en sia fino kaj kiel rilatas tio kun tiu milito.

Aliĝu al : NISIO Tutomu
kata, Takadono 4-13-3,
Asahi-ku, Oosaka-si, 535
Japanio. Tel: 81-(0)6-958-2503. Fakso:81-(0)6-958-2504. *Rete: NBG02407@niftyserve.or.jp*

La TTT-paĝo de la Komunista Frakcio de SAT



70-a Kongreso de S.A.T.

02.-09.08.1997 en Augsburg

OKK :
Prezidanto : Hermann Schmid
Adreso : Esperanto-Press Augsburg, Hermann Schmid, Waterloostrasse 21, DE-86165 Augsburg,
Telefono el eksterlando : + 39.821.792835 ; el Germanio : 0821 / 792835 + 488149
Poŝtkonto : Hermann Schmid, Sonderkonto 86356 Neusäß. Postgiramt München Kto-nro 56 99 93-808 (Bank-kodo 700 100 80) por 70a kongreso de SAT 1997 - Augsburg.

KONGRESKOTIZOJ	**ĝis 1997.06.15**	**poste**
SAT-membro	124.-DEM	10% pli
SAT-geedzoj	206.-DEM	en ĉiuj
SAT-gejunuloj	66.-DEM	kategorioj
Gasto	176.-DEM	
Gast-geedzoj	246.-DEM	

Infanoj (ĝis 15 j) ne pagas la kotizon

La supre menciitaj kotizoj (kategorio A) validas por la partoprenantoj el la landoj de Eŭropo ne sube menciitaj kaj el Aŭstralio, Israelio, Japanio, Kanado, Usono, Korea Respubliko, Sudafriko.
La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI (kategorio B) ĝuas 30 % rabaton.
La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa SU, eksa YU krom SI kaj ĉiuj afrikaj, amerikaj kaj aziaj landoj krom supre menciitaj (kategorio C) ĝuas 50 % rabaton).
La aliĝilon bonvolu peti ĉe la adreso de la O.K.K.

PROVIZORA PROGRAMO DE LA 70-A KONGRESO DE SAT

Sabato 2.8.97 : Alveno kun akcepto.
Post la vespermanĝo :
Interkona vespero.

Dimanĉo 3.8.97:
- 10h00 - Solena malfermo
- 14h00 - Urba rondveturado
- 16h30 - Akcepto ĉe urbestro
- 20h00 - Muzika vespero

Lundo 4.8.97:
- 9h00 - Laborkunsido
- 14h00 - SAT-funkciuloj kaj aktivuloj
- 16h00 - LEA-Komitato
- 18h00 - Liberecanoj
- 20h00 - Diskuto kun sindikatistoj

Mardo 5.8.97 :
- 9h00 - Laborkunsido
- 14h00 - Duontaga ekskurso
- 20h00 - Internacia koncerto

Merkredo 6.8.97 :
- 9h00 - Tuttaga ekskurso
- 20h00 - Lumbildoj

Ĵaŭdo 7.8.97 :
- 9h00 - Laborkunsido
- 14h00 - Duontaga ekskurso
- 20h00 - Akademio de Esperanto (d-ro Bormann, prezidanto de AdE).

Vendredo 8.8.97 :
- 9h00 - Laborkunsido
  - Forumo
- 14h00 - TANEF
- 15h00 - Liberecanoj
  - Komunista frakcio
- 16h00 - Sennaciistoj
  - Sindikatistoj
- 20h00 - Teatra vespero

Sabato 9.8.97 :
- Foriro

Estas antaŭviditaj jenaj prelegoj :
- Sociala Eŭropo
- Mondigo de la ekonomio
- Omaĝo al kamarado Lanti
- Evoluo de kontraŭkoncipaj metodoj

kaj ankoraŭ kelkaj aliaj.

KVARA LISTO DE ALIĜINTOJ

89. M.F. Toubale (FR); 90. D. Pick (DE); 91. N. Koulechova (RU); 92. G. Ledon (BR); 93. S.Schenk-Ledon (BR); 94. L. Vulfoviĉ (DE); 95. S. Damjanova (BG); 96. R. De Clerck (BE); 97. T. Popova (UA); 98. G. Fadejev (UA); 99. Ĵ. Rada (CZ); 100. E. Simonoviĉ YU); 101. R. Simonoviĉ (YU); 102. S. Stojlikoviĉ (YU); 103. R. Miljakoviĉ (YU); 104. S. Buzinover (RU); 105. V. Kobzarj (RU); 106. V. Mavrin (RU); 107. W. Brandenburg (DE); 108. M. Brandenburg (DE); 109. M. Ramelli (FR); 110. N. Kalinkina (UA); 111. M. Pfister (DE);

VENU AL AŬGSBURGO SAT BEZONAS VIN KAJ NI ĈIUJ BEZONAS ĜIN

★

ESPERANTO
SENNACIECA LINGVO

EL ESPERANTO-MOVADO

❒ **Renkontiĝo de esperantistaj familioj** okazos en la urbo Savudrija, Kroatio, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1997. La tuta programo estas preparita por infanoj kiuj en siaj hejmoj praktikas Esperanton. Tie ili povos ludi kaj amikumi kun diverslandaj samaĝuloj kaj samlingvuloj. La gepatroj estas petataj prepari kaj partopreni en la programo. Restos ankoraŭ sufiĉe da tempo por ke ankaŭ la plenkreskuloj amuziĝu. Ĉiujn informojn petu de : *Familio Tišljar, Stubička 75, HR-10000 ZAGREB, Kroatio. Tel.: +385.1.328.265., fakso: +385.1.481.01.52.*

❒ **2-a Internacia E-Feriado kun Folkloro** okazos en la plej ĉarma pola montaro Pieniny de la 1-a ĝis la 15-a de septembro 1997. Vi konatiĝos kun loka folkloro kaj libere povos prezenti tiun de via regiono. Ĉiujn informojn petu de : *Pola Esperanto-Asocio, Rondo en Kroŝcienko, str. Kingi 6, PL-34-450 Kroŝcienko n/Dun, Pollando.*

❒ **Japana Esperanto-Korespondo-Servo** konstante akceptas korespondezirojn kun japanoj. Skribu unuope al ĝi: *KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si 561, Japanio.*

❒ **La 29-a Korea Kongreso de Esperanto** okazos de la 25-a ĝis la 26-a de oktobro 1997 en la antikva urbo Kyongju. Kyongju estis la ĉefurbo de la dinastio Shilla dum milo da jaroj kaj en ĝi troviĝas amaso da historiaj konstruaĵoj, temploj kaj pluraj artaj monumentoj. Post kiam Shilla unuigis la duoninsulon en 676, la urbo disvolviĝis en unu el ĉefaj kulturcentroj de la mondo. Kyongju estas konata kiel "senmura muzeo", ĉar ĉiupaŝe troviĝas trezoroj kaj historiaĵoj.
Petu informojn al: *Korea Esperanto-Asocio, C.P.O. 4258, Seulo 100-642, Koreio. Interrete :keast@soback.nm.kr;*
TTT-paĝo: http:/aistar.kotel.co.kr/~espero/kea

❒ **Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Naturamikoj** okazos en norda regiono de Ĉeĥio, en la t.n. Triangulo - proksime al la landlimoj kun Germanio kaj Pollando. Informas : *Esperanto, M. Jira, Mechova 8/32, CZ-46604 Jablonec n. N., Ĉeĥio.*

S.A.T.  **erinaco**

DISTRA PAĜO POR SERIOZAJ SAT-ANOJ

AŬ NI DENOVE KLASKONSCIOS



AŬ NI ESTOS MARIONETOJ EN ILIAJ MANOJ !

